

# Somera Esperanto-Studado 2020

Milan Kolka

Someran Esperanto-Studadon oni ne devas prezenti al multaj esperantistoj. Ĝi estas la plej granda internacia Esperanto-lernejo en mondo. Ĝi okazas regule ĉiujare ekde 2007 en Slovakio. En la jaro 2014 okazis eĉ du SESojn – en Nitra kaj en Moskvo. En la jaro 2016 SES ne okazis, ĉar la sama teamo organizis UK en Nitra. Ĉi-jare estis planite, ke la somera lernejo okazos en Ĉeĥio en la urbo Kroměříž.

Mi devas konfesi, ke ĉi-jare mi ne planis partopreni SESon. Mi volis vojaĝi en Latvion kaj partopreni en Baltiaj Esperanto-Tagoj en Jelgava.

Do ni planis kaj forgesis, ke naturo povus ŝanĝi niajn planojn. En ĉina grandurbo Wu-Chan, pri kiu preskaŭ neniu, almenaŭ en Ĉeĥio, eĉ aŭdis antaŭe, aperis stranga malsano. Poste oni malkovris, ke tiun ĉi malsanon kaŭzas nova korona viruso. Ni en Eŭropo unue pensis, ke tio estas nur nova ĉina loka malsano, simila al SARS, kiu restos en fora Ĉinio. Ni ne povis imagi, ke dum kelkaj semajnoj la malsano fariĝos pandemio kaj disvastiĝos en la tutan mondon. Multaj homoj malsaniĝis, multaj eĉ tiel grave, ke ili devis esti zorgataj en malsanulejoj. Kaj la hospitaloj ne sufiĉas por zorgi pri ĉiuj kaj multaj homoj mortis. En Ĉeĥio la situacio ne estis tiel malbona kiel, ekzemple, en Italio, ĉar nia registaro rapide enkondukis tre striktajn rimedojn por malebligi la disvastiĝon de la malsano.

Tial renkontiĝoj de homoj estis malpermesataj. Esperanto-aranĝoj estis nuligitaj aŭ prokrastitaj al venonta jaro. Ankaŭ BET kaj SES estis prokrastitaj.

Sed oni diras: “Ĉio malbona estas por io bona”. Multaj homoj devis labori hejme per komputilo kaj devis lerni novajn rimedojn. Laborkunvenoj ne okazis fizike, sed rete uzante retajn videokomunikilojn. Ankaŭ lernejoj devis instrui nur rete. Programoj por kreado de videoj kaj videokomunikiloj estis uzataj de pli da homoj ol antaŭe.

Ekzemple en nia laborejo oni uzas videokomunikilon Teams. Antaŭ epidemio mi uzis ĝin nur por tekstaj mesaĝoj.

La teamo de organizo E@I ne dormis kaj kaptis okazon kaj kreis sistemon nomatan Retevent. Danke tion SES povus okazi. Ne fizike, sed almenaŭ virtuale, rete.

La ĉefa parto de SES estas kompreneble instruado. Ĉi-jare okazis lingvaj kursoj de niveloj A2 (instruis Marion Quenut kaj Christophe Chazarein), B1 (instruis Arina Osipova kaj Przemysław Wierzbowski), B2 (instruis Szabolcs Szilva kaj Tim Morley) kaj C1 (instruis Konstantin Tikhomirov). Okazis ankaŭ du specialaj kursoj: Esperanto-literaturo kaj kulturo (instruis Oleg Ĉajka) kaj Kurso pri tradukado de kaj al Esperanto (instruis Mikaelo Bronŝtejn). Duono de kursoj okazis antaŭtagmeze (de la 9-a ĝis la 14-a h.) kaj la dua duono posttagmeze (de la 14-a ĝis la 19-a h.), tempoj en mezeŭropa somera tempo. La posttagmezaj kursoj estis taŭgaj por Amerikanoj. Mi ĉi-jare elektis kurson de Mikaelo Bronŝtejn.

Kutime SES komenciĝas sabate vespere kaj finiĝas venontsemajne dimanĉe posttagmeze. Lecionoj okazas ĉiutage ekde dimanĉo ĝis sabato, krom merkredo, kiu estas ekskursita tago. Ĉi-jara virtuala SES okazis precipe dum ambaŭ semajnfinoj. Oficiala fermo ne okazis sabate, sed jam vendrede vespere. Ni ankaŭ povus kontraŭi kun la sistemo. Tial la lecionoj povus komenci tuj sabate matene (por antaŭtagmezaj grupoj). Mallongaj lecionoj.

Instruado okazis per sistemo BigBlueButton. BigBlueButton estas malfermitkoda sistemo por retaj konferencoj. La sistemo iomete similas al sistemo Teams de Microsoft, kiu estas uzata en nia universitato.

Unue, BigBlueButton estas videokomunikilo. Ni ĉiuj povus vidi la instruiston kaj aliajn gestudentojn. Ankaŭ eblas vidi nur unu homon. La instruisto povas ankaŭ montri sian ekranon, kie li havis ekzemple malfermitan pdf dosieron kun tradukata teksto. Same kiel en similaj sistemoj, ankaŭ en BigBlueButton ekzistas teksta babilejo. Oni povas sendi kaj publikajn mesaĝojn al ĉiuj homoj en la klasĉambro, kaj privatajn mesaĝojn al iu ajn el la klasĉambro.

Instruisto povas uzi du tipojn de lernejaj tabuloj. La unua nomiĝas Komunaj notoj kaj estas nur teksta. Ĉar ĝi estas teksta, oni povas facile kopii tekstojn el ĝi. La dua, blanka tabulo, funkcias simile al ordinara tabulo en lernejo. La instruisto povas desegni ion ajn sur ĝi. Ankaŭ eblas, ke desegnas la gestudentoj. En nia kurso la blanka tabulo ne estis uzata, nur komunaj notoj.

Interesa plibuntigo estas voĉdonado. Ekzemple instruisto donis ian nekonatan vorton kaj proponis kvar signifojn. Ni voĉdonis por ĝusta signifo. La instruisto vidis, kiu kiel voĉdonis, kaj la gelernantoj poste vidis, kiom da elcentoj ricevis la proponitaj respondoj.

Unu funkcio mankis al mi. En la sistemo ne estas loko, kien la instruisto povus meti dosierojn, kaj mankas transdonejo – loko, kien gelernantojn povus enmeti siajn plenumitajn hejmtaskojn. Se la instruisto volis doni al ni iun dosieron, li devus sendi ĝin per retroŝto kaj ankaŭ gelernantoj transdonis hejmtaskojn retroŝte.

Somera Esperanto-Studado ne estas nur studado. La programo de SES-oj estas tre riĉa. Prelegoj, ekskursoj, koncertoj, gufujoj kaj trinkejoj, kulinara festivalo, naciaj kaj internacia vesperoj. Ne mankas ankaŭ babilado dum manĝoj. Ne ĉio povis okazi dum virtuala aranĝo.

Prelegoj kaj koncertoj ne mankis. Ili okazis rete per la platformo Retevent. Prelegoj estis diversaj. Pri E@I, esperanto-slango, esperantistaj eldonejoj, pri ĝardenoj.. El kantistoj mi volas nomi JoMo kaj Kaŝi. Okazis ankaŭ poeziaj duonhoroj. Mi tre ŝatis gramatikajn angulojn kun Birke kaj Bertilo. Tiuj ĉi prelegetoj kun demandaro okazis dum SES kvarfoje. Ili estis preparataj de Bertilo Wennergren, aŭtoro de Pomego (pardonu, PMEG – Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko) kaj lia edzino Birke Dockhorn. Ĉiuj prelegoj kaj koncertoj estis registritaj. Partoprenantoj tiel povas spekti prelegojn, kiujn ili ne sukcesis vidi vive. Organizantoj anoncis, ke ni povus atingi registraĵojn unu monaton post SES. Sed ili funkcias ankoraŭ nun, en oktobro.

Babilado en manĝejoj, gufujoj kaj trinkejoj estis anstataŭigitaj per retaj babilejoj. Okazis kaj paroligaj rondoj kaj vesperaj babilejoj. Nek lecionoj nek babilejoj estis registritaj.

Virtuala aranĝo kompreneble ne havas saman etoson kiel ĉeesta aranĝo. Ne povis okazi ekskursoj. Mi konfesas, ke mi ŝatas ekskursojn dum SES. Babilado per komputilo ne estas sama kiel rekta babilado. Ĉar tagmanĝpaŭzo daŭris nur duonhoron, mi devis kuir tagmanĝon jam matene aŭ la antaŭan tagon.

Virtuala SES ne havis nur malavantaĝojn, sed ankaŭ avantaĝojn. Virtuala SES estas pli malmultekosta ol la ĉeesta. Oni ne pagas vojaĝkostojn, loĝadon, manĝadon en manĝejoj. Oni ankaŭ ŝparas monon, ĉar oni ne povas aĉeti esperantaĵojn (precipe librojn). Mi ŝparis minimume kvar kvinonojn kompare kun ĉeesta SES. Mi ne ŝparis nur monon, sed ankaŭ feriojn. Dum laborsemajno mi laboris kiel normale, nur dum semajnfinoj mi restis hejme partoprenante SES-on. Mi ankaŭ sukcesis en la sama sabato esti antaŭtagmeze en SES kaj posttagmeze veturigi mian filon en tendaron en urbon kvindek mil kilometrojn for de mia loĝejo.

Mi tre dankas al E@I, ke ili ne rezignis kaj organizis SES-on en reta formo. Laŭ mi ĉio, kio povus esti konservita el normala SES, la organizantoj konservis. Prepari retan aranĝon estas sendube pli malfacila tasko ol prepari la normalan. Kaj ankaŭ granda defio. E@I sukcesis. Atestantoj ne estas nur SES-anoj, sed ankaŭ partoprenantoj de aliaj sukcesaj Esperanto-aranĝoj, kiujn okazis per Retevent – Virtuala Kongreso, IJK, KAEST, Lingvistika Seminario k.a.

Malgraŭ tio mi esperas, ke venontjare la ĉina malsano estos bridita kaj esperantistaj eventoj povus okazi denove fizike.

*Verkita en Brno en oktobro 2020.*

*La prelego okazis la 15-an de septembro 2020 en nia klubejo. Video de la prelego estas atingebla en Jutubo ĉe <https://youtu.be/qSvwOme5nro>.*